PENSEO

N-ro 269

mar. / 2014

Monata Beletra Revueto en Esperanto

Honorita de Premio Grabowski,1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 25-a jaro http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm

Anteo (Ĉinujo)



la historio ripetiĝas

iam la drako povis flugi kaj kuri laŭvole.
nun blinda ĝi sur marĉo kuŝas kiel ŝtipo.
kiam vermoj la internon mordas ĝis la kapo,
tiam nepre ratoj ĝin en pecojn ŝiros senskrupule.

la leĝo de la ĝangalo

tigroj kaj leonoj estas ja demokratiaj;
ili lasas bovojn kaj ĉevalojn memelekti morton aŭ rifuĝon.
malfortuloj estas ja liberaj;
ili havas la rajton oferi sian teron aŭ ŝafaron.



paneo de elektro

paneo de elektro! ĉio solidiĝis ekster pordo.
imago en la kapo kontrolas lineojn.
iuj batalas kaj aliaj jam kapitulacis.
scenoj el filmoj prezentiĝas nun sur la reala tero.

kien mi iros?

la vojaĝsako estas plena de ideoj.
kien mi iros sen reveno?
veturpago kaj celloko al mi mankas.
kun diplomo mi laboron ofte serĉas en la lito.




Mori (Usono)



Fabeleto

Maljuna vulpo
Juna lupo
kune decidis ataki
kaj disŝiri ŝafon
jam vunditan
por alte teni
la standardon de Moralo
en ĝangalo!
Tuj aliĝis ankaŭ la oportunista
ŝakalo!
Jen perfekte justa batalo
por alta moralo!
HURA!



Nazaré Laroca (Brazilo)



Forkurvojo

Al Poeto Iacyr Anderson Freitas

Viaj tagoj kovritas
de la cement' el versoj
kaj la silent' de oratori' :
brulanta kandel', mister'
de la nokto sen eskapo.

Tamen cirklas la pado
de via itinero lukta:
alvenontas ĉiu forir'...
Ju pli dista, des pli apudas
la eterneco dresita.



Drinkejo

La bierodor' ŝvita
serpentumas
tra drinkejo ŝima
kaj englutas
la nokton urban.

Malplenaj boteloj
sur la tabloj
prizorgas ĉagrenojn
kaj riskojn malkaŝas.

La memoro nuna
estas perdita hundo
sur iamaj vojetoj,
vaganta tra la cindroj
de l' revoj incendiitaj.

Juiz de Fora, 10/12/2013.

Petro Palivoda (Ukrainio)



Printempo

riveroj enfluas maron
por iĝi la oceano
printempo
degelas glacio
kaj kein vi estos fluonta
fonteto de mia animo



Aelita

Inter ni estas kosmo malvarma
kaj fora stelaro.
Mi tra spaco senfina
rigardas stelplenan ĉielon.
Okuloj-kvazaroj lumas.
Distancon je kelkaj paŝoj
mezuras parsekoj.
Kvankam mi ĉiun momenton
al vi flugadas,
vi estas tiel de mi
malproksime.





Kroniko de tago

du aeroplanoj
estas paffaligitaj
de super irako
dufoje
dinamo golis
kaj vi ridetis

al mi dufoje

Catherine B. Krause (Nederlando)





Anonco 1
Ni vendas taglibron;
ĝi apartenis al nia avo.
Li aĉetis ĝin post la milito,
sidis antaŭ ĝi
ĉiutage kun skribilo
kaj neniam skribis eĉ vorton.

Anonco 2
Mi serĉas la virinon
el mia lastanokta sonĝo.
Ŝiaj okuloj estis la Rivero Cuyahoga,
kaj ŝia tuŝo estis la unua guto
de neglaciigita pluvo, kiu falas
sur vian ŝultron komence de printempo.

Anonco 3
Mi serĉas drinkeman, kolereman fiŝkaptiston
por kunlabori al ia verko.
Alprenu pentrilojn, filmilojn
kaj eble skribilojn kaj paperon; mi ne certas,
ĉu ni bezonos iun ajn el tiuj,
sed tre gravas, ke ni verku ĝin.

Anonco 4
Mi serĉas hundon,
brunan Germanan Ŝafhundinon.
Ŝi fekas sur la tapiŝon kaj bojas al nekonatoj.
Se vi trovos ŝin, donu al ŝi ludilon
plenan kun manĝetaĵoj kaj arakida butero.
Ŝi ricevas tion ĉiutage kaj ĝi devas manki al ŝi.

Anonco 5
Mi vendas pupojn en la formo de piratoj.
Ili iam estis miaj, sed mi plenkreskiĝis
kaj ne plu bezonas tian stultaĵon.
Se vi havas demandojn, kontaktu mian
sekretarion. Mi ne plu havas tempon
por respondi.

Anonco 6
Mi vendas gitaron,
1975an Fender Stratokaster,
nigran kaj blankan. Mi esperas
ke ĝi portos vin kien ĝi neniam portis min:
al la staĝo, antaŭ milojn da ŝatantoj,
for de la kripliganta krueleco de l' moderna ekzisto.

Anonco 7
Mi trovis la plej bonan rakonton, kiun mi iam legis,
en Klevlanda rubujo, skribitan per mano.
Se vi estas la verkisto, mi petas ke vi bonvolu
daŭri verkadi, kaj se vi ne volas veni
por preni ĝin, almenaŭ lasadu viajn rakontojn en la sama rubujo.

Anonco 8
Mi vendas poŝfotilon akvorezistan kaj bonkvalitan
kun amorvideoj pri mia eksfianĉino
(la mensogema, trompema putino!)
Vi rajtas preni ĝin el la haveno.
Mi ĉeestos. Post kiam ŝi lasis min,
nur restas mia boato.



Anonco 9
Kriptologo bezonata por malcifrigi la kodojn
kiujn mi trovis kaŝitaj en Finnegans Wake.
Li nepre scipovu obstrukci radiajn ondojn,
ĉar iu uzas radion por regi mian familion
kaj kaŭzi, ke ili provu ĉesigi min de ĉi tiu
grava laboro. Kaj ial iliaj okuloj havas larmojn.


Anonco 10
Mi serĉas la senton, kiun mi ricevis infanaĝe
kiam neĝo estis sorĉa kaj marvela afero,

kiam mi unue glitis slede de sur la monteto,
elsledîĝis kolizie kun neĝulo kaj finis la vesperon
ridante, trinkante ĉokolaton.
Kiom kostus? Ne gravas.

Anonco 11
Mi trovis la taglibron de juna knabino,
registron de ŝia ŝanĝo de dolĉa, senzorga
10-jarulino al adoleskantino kiu tutkore amas
knabojn, feliĉas kiam ili amas ŝin, kaj deprimas kiam ne.
La lasta paĝo diras: “Ĉi-matene mi vomis.
Mi esperas, ke nenio misas.”

Anonco 12
Artema ino serĉas solan viron
kiu sonĝas ofte, eĉ ĉiutage,
kaj konigos siajn sonĝojn por ke ŝi pentru ilin,
kaj kiam ajn ili volos eliri
ili povos rigardi pentraĵon kaj
vivi dum momento en sia kolektiva sonĝo.

Paŭlo Silas (Brazilo)



LA PROGRESO POSTULAS PLU

Blanka erarvaganta glacimonto:
Peco de noktonigra estonteco.
Sola, sub suno, flugas la kolombo:
Beko, de l’ fino, portas la amplekson.

Belas la rozkolora progres-ponto.
Ilin transprenas teatreca deco.
Pusas okulbril’ antaŭ atombombo.
Korpokapablo perdas la reflekson.

Krevis konfesdevige la kranio:
Nia agad’ aliras al plejbono,
Justan ĝustecon ĉiam celelektis.

Marŝis memfide, luktis en misio;
Beste obeis, blinde laŭ ordono.
Gloron postmortan ili ŝirkolektis.



Cezar (Germanujo)




Kaj neniam plu revenu!

Mi estas jam delonge antaŭ vi ĉi tie,
kaj mi restos ankoraŭ tiam en tiu silentejo,
kiam vi delonge estos reirinta
al via familio.

Mian nomon, tiun? Tiun mi dum jaroj
ne plu aŭdis, tiel, kiel ĉiuj aliaj
ĉi tie.

Kompreneble, nomojn ni ankoraŭ havas, ĝis
ankaŭ ili estos palaj, de l' vento taŭzitaj,
forlavitaj, detruitaj kaj fine forblovitaj.




Sed neniu plu alparolas nin per niaj nomoj.
Rigardu foje ĉirkaŭ vin. Kion vi vidas?
Ĉu vi rimarkas? Nomojn kaj nomojn
kaj nomojn. Ili ĉiuj estis homoj, iam.
Antaŭ ol ili venis ĉi tien.

Ĉirkaŭrigardu ankoraŭfoje. Kaj nun rerigardu al mi.
Kion vi vidas? Jes, vi vidas nur vortojn
ĉizitajn en ŝtonon - sur mia tombŝtono.

Ne forgesu tion, se vi revas plu pri mi, mia kara.
Ne forgesu, ke mi estas nun morta por vi.
Ĉu vi komprenas? Morta!

Foriru do de ĉi tie.
Vivu antaŭ ol vi mortos.
Kaj neniam plu revenu!

Carlos García Berlanga（1959-2002）



Mi dancas

Mi dancas.
La tutan tagon mi dancas,
Dum la najbaroj min minacas,
Kaj plu kaj plu tedas min.
Mi drinkas.
La tutan tagon mi drinkas.
La koktelilon mi svingas.
Stimulas min la vermut'.


Miaj artikoj pivotas fole,
Kaj eĉ femuro pendolas drole.
Min turmentas vertiĝ',
Sed gravas nun mia prestiĝ'.

Dancas mi tuttage,
Sole aŭ akompane.
Svingo de kruro, svingo de brak',
Svingo de pugo kaj de kap',
Svingo de piedo, svingo de fibul´
Svingo de la koksoj, de genu' kaj tiel plu.
Mi dancas...
Mi dancas.
La tutan tagon mi dancas,
Dum la najbaroj min minacas,
Kaj plu kaj plu tedas min.
Mi drinkas.
La tutan tagon mi drinkas.
La koktelilon mi svingas.
Stimulas min la vermut'.

Miaj artikoj pivotas fole,
Kaj eĉ femuro pendolas drole.
Min turmentas vertiĝ',
Sed gravas nun mia prestiĝ'.

Dancas mi tuttage,
Sole aŭ akompane.
Svingo de kruro, svingo de brak',
Svingo de pugo kaj de kap',
Svingo de piedo, svingo de fibul´
Svingo de la koksoj, de genu' kaj tiel plu.

Esperantigis



Svena Dun (Hispanujo)

Charles Trenet (1913-2001)



Junajn Jarojn Miajn

(1949)

Junajn jarojn miajn
Kure tra la montar',
Kure tra la padoj
Bird'- kaj flor-plenaj.
Kaj Pireneojn
Kantigas l'hispana vent',
Kantas la melodion,
Kiu luladis min,
Kantas memoraĵojn
De l'frua infan',
Kantas ĉiujn tagojn belajn
Kaj pasintajn for,
Kaj, kiel paŝtist'
De l'montoj francaj
Kantas pri trista sopir'
Je mia bela land'.


For de ĝi, de l'rojoj for,
For de l'petolaj fontoj
For de l'kante freŝaj akvoj,
Kaj de l'muĝaj kaskadoj for
Revas mi, tio estas mia kanzon'
Je l'feliĉaj traviv' de l'unuaj sezonoj.

Junajn Jarojn miajn
Kure tra la montar',

Kure tra la padoj
Bird’- kaj florplenaj.
Kaj Pireneojn
Kantigas l’Hispana vent’,
Kantas la melodion,
Kiu luladis min,
Kantas memoraĵojn
De l’frua infan’,
Kantas ĉiujn tagojn belajn
Kaj pasintajn for,
Kaj, kiel la paŝtist’
De l’montoj francaj
Kantas pri l’dolĉa ĉiel’
De mia bela land’.



Esperantigis



Roland Platteau (Francujo)
02/2002

Shefqete GOSALCI

Sentimento

Ŝirita kaj ĉifonita luno
Rigardas min rekte el la ĉielo
Ĉar jam estas elĉerpita mia pacienco
mi ekiros kaj baldaŭ estos mia alveno

Spite la longan vojon
La montojn kaj kampojn intere
mia sopiro forfaligas eĉ la kastelon
Ne mortos mi sen vin vidante senpere

Vi ja estas por mi arda fadeno
Knedita el la sopiraj radioj
Pro tio neniam estas ĉe mi nokto
Sed nur ja senfinaj matenoj

Al vi mi iras kaj revenas ĉiamfoje
Nenio eskapas disde viaj sensoj
Ĉiun abismon mi forfaliga vianome
Kaj mi envolvas tutan ĉi mondon per pontoj

Diras mi "mi amas vin", kaj ridetas
Kaj vi ion susuris al mi
Ĉi tiu ponto inter ni etendiĝas
Esta ja amo super amo ĝi

Nesto sur ondo

La matenan kafon mi eltrinkis ankaŭ hodiaŭ
Sed ne vola alleviĝi fronte de mi la tago
Trafi in envane kelkaj idiotoj tagon antaŭ hieraŭ
Tiuj kiuj eĉ la sunon turnas al batalĉevalo

Kaj ni peti al la kolombo alveni ĉe min
Sed ĝi forflugis al senadresita ĉielo
Ĉar hieraŭ el paradizo oni forpeli ĝin
Kaj fanditan pulvon enĵetis al la buŝo

Nun ĝi komprenis ke mi mondon eniris
Kiu la mia neniam fariĝis
Ĉi tie kie la absurdo per larmoj nutriĝis
Kaj la feliĉaj momentoj en abismo flatis

Kion mi faru kun vi mia amo
Sur ondo mi starigis neston
Kaj forfuĝis el ĉi tiu karneca prizono la animo
La nuba ĉielo super la staturon

Nu parolu do kion mi faru mia amo
Ĉar tiu tempo ĉiujn amojn miajn mortigas
Kvankam kostis al mi suferaĵan monton tio
Mi neniam supren la manojn levas



Esperantigis



Bardhyl Selimi
(Albanio)

Ĉineske

Vejdo



Bondeziroj ĉe Printempa Festo

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo**

Jen
la Novjaro de ĝojplen'
alvenas
kun salut' kaj ben'.

Jam
meritoj de tuta gam'
forpasis
kaj vanta aklam'.

Ne
kuŝu sur inta ide'
stagniga
malutila tre.

Plu
ekmarŝu sen ajna sku'
agu kun
pli da kontribu'.

En
nova jaro ni kun pen'
pli granda
por verd-entrepren'.


2014-01-30



printempa festo: ĉina tradicia novjaro

***Dekses-Silabo (Ĉine: Shiliuziling): ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)*

Jadranka Miric (Serbujo)




Al lernejkamaradino

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

La lastan
saluton al vi.
Kolektiĝis amikoj.
Kor' ne povis elteni.
Ĉesis tiktaki.

Surprizo.
Doloro kaj plor'.
Vi akuŝis kaj flegis.
Ĝoigis vin ĉiu mor'.
Bona ina kor'.



Suferis
vi dum militoj.
Ne ĉiuj iĝis homoj.
Ja, multe da krimuloj.
Mankis estimoj.

Nenio
iĝis facila.
Via redonita domo
iĝis hela bonstila.
Je rigard', brila!

Ve, fino.
Nun ripozu, vi.
Senmorta estos memor'.
Belaj rozoj nur por vi.
Adiaŭ Ĵiĵi.

La poemon mi dediĉis al mia lerneja kamaradino živka-žiži -ĵiĵi radivojeviĉ -ubiparip, forpasinta la 27an de januaro 2014.

Ne juĝu homon laŭ vesto

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Azeno
en leonvestaĵ'
aspekt' leona vera.
Ja, malbravas la estaĵ'
scias ĉirkaŭaĵ'.

Obstina,
kvankam ne fia..
Nur melodio ĝia
famiĝis. Fortas "ia"
la bleko ĝia.

Alvenis
ja, homoj mire.
Leon' ekster ĝangalo?
Iuj ekfuĝis "vire".
Sed, piedire.

Surprizo.
Azenoreloj.
La trompo malkovrita.
Kiel el verko perloj,
la fonten** fabloj.


La stango
kolerigita
ekbatis la friponon,
en la leon' maskita.
Instru' donita.



**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimarango xa,xa,a (x=senrima).*

***Lafonteno: franca poeto kaj fablisto*

Catherine B. Krause (Nederlando)



—laŭ ĉinesko Kuxiangsi*

Vaporas la tuta viv',
mankas al
ĝi signif',
eĉ sencelas
labora soif',
nihilpeno sen kvalif'
tristega
pro mistif'.

Ne eblas senca deriv',
sensencas
la edif',
ne ekzistas
kiala specif',
sed sekvendas direktiv'
ĉiela
sen modif'.

**Kuxiangsi (Profunda sopiro): ĉina fiksforma poemo el du samaj strofoj kun po 8 versoj de 7,33,8,33,33 silaboj, laŭ rimarango a,xa,xa,xxa (x = senrima)*

Androgino

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo*

Vi
amas ideon de mi,
senseksa
kvazaŭ amfibi'.

Ĉu
okazas al vi la ĝu'
volante
fali al genu'

aŭ
ĉu vi simple volas naŭ
komplezojn

jen ĝis la morgaŭ?

Min
ne amu stile de in',
nek viro,
nur de Katerin'.

Viktoro (Ĉinujo)

Damninda fumnebulo

—laŭ ĉinesko Litingyan*

Jen malalte pendas
svage griza vual'.
Ĉu fumo aŭ nebulo?
Ĉu polv-pluvo en fal'?
Jen malutilaĵ'
nevideblas en pal'.

La homaro faras
tion jen per fatal'
nocas sian vivon mem.
Ni per tokso-regal'
ja mortigos nin
per lasta festival'.

**Litingyan (Hirundo ĉe kiosko): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 6 versoj de 66, 76, 56 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,xa (x=senrima)*

Lily (Ĉinujo)

Sed masturbu vin, kara!

—laŭ ĉinesko Linjiangxian*

I.

dum mia foresto
vi vivas amara
sed masturbu vin, kara
por malsoif' al
geiĝo para

dece konsolu vin
per ago ripara —
rimedo sanitara
lasu libidon
ludi senbara

II.

mia sola esper':
nepre ne ŝovu vin
en la truon de virin'
sekse malpura
por kaca uzin'

vi masturbu vin do
ne bridu per abstin'
la mano estas vagin'
frotu re kaj re
ja kvazaŭ en min

**Linjiangxian (Feo ĉe kiosko): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 5 versoj de 66,7,55 laŭ rimaranĝo xa,a,xa (x=senrima)*

Maupassant (1850-1893)



LA KAPTITOJ

(I)

Nenia bruo en la arbaro ol la delikata susuro de la falanta neĝo sur la arboj. Ĝi falis de post tagmezo : fajna etneĝo, kiu pudris la branĉojn de glacia ŝaŭmo, kiu ĵetis sur la mortajn foliojn de la densejoj etpezajn arĝentajn tegmentojn, etendis sur la vojojn vastegan ŝvelmolan blankan tapiŝon, kaj kiu densigis la senliman silenton de tiu arboceano.

Antaŭ la pordo de la arbaristejo, juna virino, kun la brakoj nudaj, fendis lignon sur ŝtono per kalilbatoj. Ŝi estis granda, maldika kaj forta, unu knabino de la arbaroj, filino kaj edzino de arbaristoj.

Interne de la domo voĉo kriis :

- Ĉi-vespere ni estas solaj, Bertina, necesas, ke vi rehejmiĝu, ĉar eknotas, eble estas Prusoj kaj lupoj, kiuj vagas.

Daŭrigante fendi stumpon per egaj batoj, kiuj restarigis ŝian bruston okaze de ĉiu movo, kiun ŝi faris kiam ŝi levis la brakojn, la arbohakistino respondis :

- Mi preskaŭ finis, panjo. Jen mi, jen mi, ne timu, ankoraŭ taglumas.

Poste ŝi kunportis en la domon la branĉetfaskojn kaj la ŝtipojn, kiujn ŝi amasigis laŭlonge de la kameno, kaj reeliris por fermi la antaŭtegmentojn, grandegajn antaŭtegmentoj el kerno de kverko, kaj fine rehejmiĝinta ŝi puŝis la pezajn riglilojn de la pordo.

Ŝia patrino, sulkiĝinta maljunulino, kiun la aĝo igis timeman, ŝpinis apud la kameno. Ŝi diris :

- Mi ne ŝatas, kiam la patro estas ekstere. Du virinoj ne estas tre fortaj.

Montrante per la rigardo dikan revolveron pendantan super la kameno, la juna virino respondis :

- Ho ! Tamen mi ja sukcesus mortigi lupon aŭ Pruson.

Ŝia edzo estis enregimentigita en la komenco de la prusa invado, kaj la du virinoj restadis solaj kun la patro, la maljuna arbargardisto Nikolao Piŝo, alinome Stilzo, kiu obstine malkonsentis forlasi sian loĝejon por iri vivi al la urbo.

La proksima grava urbo estis Rethel, malnova fortreso alte lokata sur roko. La urbanoj estis patriotoj, kaj la burĝoj decidis kontraŭstari la invadantojn, enfermiĝi en la fortreso, kaj elteni sieĝon laŭ la urba tradicio. Jam dufoje, sub la regadoj de Henriko la 4-a kaj Ludoviko la 14-a, la loĝantoj de Rethel distingiĝis per heroaj defendoj. Ĉifoje ili faros same, ventro de Dio ! Aŭ oni bruligos ilin en iliaj muroj.

Do, ili aĉetis kanonojn kaj fusilojn, armis milicon, formis batalionojn kaj kompaniojn, kaj ĉiuj ekzerciĝis dum la tuta tago sur la Armilplaco. Ĉiuj, panistoj, spicitoj, viandistoj, notarioj, proceduristoj, lignaĵistoj, libristoj, eĉ apotekistoj, laŭvice manovris je regulaj horoj, sub la ordonoj de S-ro Lavito, eks-suboficiro de dragonoj, nun merceristo, post edziĝis kun la filino, kaj heredis la butikon, de S-ro Ravaŭdo, la unuenaskito de la klano.

Li donis al si la rangon de majoro-komandanto de la fortreso. Kaj pro tio, ke ĉiuj junaj viroj estis en la armeoj, li soldatigis ĉiujn aliajn, kiujn li ekzercadis al la kontraŭstaro. La dikuloj iris nur kurpaŝe tra la stratoj por malgrasiĝi kaj plibonigi sian spiradon, la malfortuloj portis ŝarĝojn por fortigi siajn muskolojn.

Kaj oni atendis la Prusojn. Sed la Prusoj ne aperis. Tamen ili ne estis malproksime ; ĉar jam dufoje iliaj antaŭesplorantoj antaŭeniris en la arbaron ĝis la arbaristejo de Nikolao Piŝo, alinome Stilzo.

La maljuna arbargardisto, kiu kuris ankoraŭ kiel vulpo, estis veninta antaŭaverti la majoron. Oni celumis la kanonojn, sed la malamiko tute ne aperis.

La loĝejo de Stilzo servis kiel antaŭposteno en la arbaro de Aveline. Dufoje ĉiusemajne la maljuna gardisto iris al la urbo por serĉi proviantojn, kaj ankaŭ donis al la urbaj burĝoj novaĵojn de la kamparo.

Tiun tagon li vizitis la urbon por sciigi al la majoro, ke la antaŭhieraŭan tagon, je la dua posttagmeze, malgranda germana infanteria taĉmento haltis antaŭ lia domo, kaj poste revojiris senprokraste. La suboficiro, kiu komandis, france parolis.

Kiam li foriris tiel, la maljunulo kunkondukis siajn du hundojn, du hundegojn kun leonfaŭkoj, pro timo de la lupoj, kiuj ekfariĝis ferocaj. Kaj li lasis la du virinojn, rekomendante al ili, sin barikadi en la domo, tuj kiam eknotos.

La junulino nenion timis, sed la maljunulino senĉese tremis kaj ripetis :

- Tio finiĝos malbone, vi vidos, ke la tuto finiĝos malbone.

Tiun vesperon, ŝi estis ankoraŭ pli maltrankvila ol kutime, kaj ŝi diris :

- Ĉu vi scias je kioma horo revenos la patro ?

- Ho ! Ne antaŭ la dekunua, nepre. Kiam li vespermanĝas ĉe la majoro, li ĉiam malfrue revenos.

Ŝi alkroĉis sian marmiton super la fajron por kuirigi la supon, kiam aŭdinte svagan bruon, kiu alvenis al ŝi tra la tubo de la kameno, ŝi ĉesis turmovi la buljonon, kaj murmuris :

- Ho ! Jen oni marŝas en la arbaro, estas ja almenaŭ sep aŭ ok viroj.

La patrino, konsternita, malfunkciigis sian ŝpinradon balbutante :

- Oh ! Mia Dio ! Kaj la patro, kiu ne ĉeestas !

Ŝi apenaŭ ĉesis paroli, kiam violentaj batoj tremigis la pordon.

Ĉar la virinoj tute ne respondis, forta kaj guturala voĉo kriis :

- Malfermu.

Kaj post silento, la sama voĉo rekriis :

- Malfermu aŭ mi frakasas la pordon !

Tiam Bertina enŝovis en sian jupopoŝon la dikan revolveron de la kameno, poste algluiĝante unu orelon kontraŭ la pordo, ŝi demandis :

- Kiu vi estas ?

La voĉo respondis :

- Mi estas la taĉmento de pasinta tago.

La juna virino reparolis :

- Kion vi atendas de mi ?

- Mi estas devojiĝanta en la arbaro, de antaŭ tiu mateno kun mia taĉmento. Malfermu aŭ mi frakasas la pordon.

La arbaristino ne havis plu elekton ; ŝi rapide eltiris la dikan riglilon, poste malfermis la pezan klapon, kaj ekvidis en la malbrila ombro de la neĝo ses virojn, ses prusajn soldatojn, la samajn kiuj venis antaŭtage. Per rezoluta tono ŝi prononcis :

- Kion vi atendas de mi je ĉi tiu horo ?

La suboficiro ripetis :

- Mi estas devojiĝanta, komplete perdita, mi rekonis la domon. Mi nenion manĝis de antaŭ tiu mateno, mia taĉmento ankaŭ.

Bertina deklaris :

- Estas, ke ĉi-vespere mi estas tute sola kun panjo.

La soldato, kiu ŝajnis brava ulo, respondis :

- Ne gravas. Mi ne malbone traktos vin, sed vi tuj preparos al ni manĝon. Ni falos pro malsato kaj laceco.

La arbaristino retroiris por lasi lokon, dirante : - Eniru.

Ili eniris, pudritaj de neĝo, kun speco de ŝaŭma kremo super siaj kaskoj, kiu similigis ilin al meringoj, kaj efektive ĉiuj aspektis lacaj, elĉerpitaj.

La juna virino montris la benkojn el ligno ambaŭflanke de la granda tablo, kaj diris :

- Sidiĝu, mi tuj preparos la supon. Estas vere, ke vi mienas kiel mortlacaj.

Kaj ŝi repuŝis la riglilojn de la pordo.

Akvon ŝi remetis en sian marmiton, enen denove aldonis buteron kaj terpomojn, poste malkroĉinte pendantan lardpecon en la kameno, ŝi tranĉis la duonon, kiun ŝi mergis en la buljonon.

La ses viroj sekvis per la rigardo ĉiujn ŝiajn movojn kun malsato, kiun oni povis diveni en liaj okuloj. Ili demetis siajn fusilojn kaj kaskojn en angulon de la ĉambro, kaj ili atendis saĝe kvazaŭ infanoj sur la benkoj de lernejo.

La patrino reekis ŝpini, ekrigardante freneze ĉiumomente la invadantosoldatojn. Krom la mallaŭta zumado de la ŝpinrado, la krakekado de la fajro kaj la murmuro de la akvo, kiu varmiĝis oni aŭdis nenion.

Sed subite stranga bruo ektremigis ĉiujn, io kiel raŭka elspiro, kiu trapasis sub la pordo, iu besta elspiro, forta kaj sonora.

La germana suboficiro impetis al la fusiloj, sed la arbaristino haltis lin per gesto, kaj ridetante diris :

- Estas la lupoj, ili estas kiel vi, ili vagas kaj ili malsatas.

La viro, nekredema, volis vidi kaj tuj kiam la klapo estis malfermita, li ekvidis du grandajn grizajn bestojn, kiuj grandpaŝe forfuĝis per rapida troto.

Li revenis sidiĝi murmurante :

- Mi ne kredus.

Kaj li atendis, ke la supo estis preta.

Ili avide manĝis ĝin, kun malfermitaj buŝoj ĝis la oreloj por plimulte engluti ĝin, kaj kun rondaj okuloj malfermiĝante samtempe ol la makzeloj, kaj gorĝaj bruoj similaj al glugloj de tegmentaj defluiloj.

Ambaŭ virinoj, mutaj, rigardis la rapidajn movojn de la grandaj ruĝaj barboj : la terpomoj ŝajnis enprofundiĝi en tiujn moviĝemajn felojn.

Sed tial, ke ili soifas, la arbaristino malsupreniris en la kelon por tiri cidron. Tie ŝi restis longtempe. Estis volba keleto, kiu laŭdire utilis kiel prizono kaj kaŝejo dum la revolucio. Oni atingis ĝin per mallarĝa helikforma ŝtuparo, kies enirejo estis fermita per klappordo funde de la kuirejo. Kiam Bertina reaperis, ŝi ridis, ŝi ridis tute sola, kun insidema mieno. Kaj ŝi donis la kruĉon da cidro al la Germanoj.

Poste, kun sia patrino, ŝi vespermanĝis ankaŭ ĉe la alia ekstremaĵo de la kuirejo.

La soldatoj finis manĝi, kaj ili endormiĝis ĉiuj ses ĉirkaŭ la tablo. De tempo al tempo frunto falis sur la tabulon kun surda bruo, poste la viro, subite vekita, restariĝis.

Bertina diris al la suboficiro :

- Nu, kuŝigu antaŭ la fajron, estas sufiĉe da loko por ses. Mi tuj supreniros al mia dormoĉambro kun panjo.

Kaj ambaŭ virinoj supreniris al la unua etaĝo. Oni aŭdis ilin ŝlosi sian pordon, marŝi dum kelka tempo ; poste ili faris plu nenian bruon.

La Prusoj sterniĝis sur la pavimon, kun la piedoj antaŭ la fajro, la kapo subtenita per iliaj manteloj volvitaj, kaj baldaŭ ili ronkis ĉiuj ses, per ses diversaj tonoj, akresonaj aŭ sonoraj, sed kontinuaj kaj laŭtegaj.

Ili dormis jam de longtempe kiam pafo sonoregis, tiom forta, ke oni kredus ĝin pafita kontraŭ la muroj de la domo. Tuj la soldatoj stariĝis. Sed du novaj eksplodbruoj krakegis, sekvitaj ankoraŭ de tri aliaj.

La pordo de la unua etaĝo abrupte malfermiĝis, kaj la arbaristino aperis, nudpieda, vestita nur per ĉemizo kaj mallonga subjupo, kun enmane kandelo, la mieno frenezigita. Ŝi balbutis :

- Jen la Francoj, ili estas almenaŭ ducent. Se ili trovas vin ĉi tie, ili tuj bruligos la domon. Malsupreniru rapide en la kelon, kaj ĉefe ne bruu. Se vi bruos, ni perdos la vivon.

La suboficiro, konsternita, murmuris :

- Mi ja volas, mi ja volas. Kie ni devas malsupreniri ?

La juna virino levis haste la mallarĝan kvadritan klappordon, kaj la ses viroj malaperis en la malgrandan spiralan ŝtuparon, enprofundiĝante unu post la alia en la kavon, dorsenirante por bone piede esplortuŝi la ŝtupojn.

Sed tuj kiam la pinto de la lasta kasko malaperis, Bertina tuj refermis la pezan klappordon el kverka tabulo, dika kiel muro, malmola kiel ŝtalo, subtenita per ĉarniroj kaj seruro de ĉelo, kaj rapide duturne ŝlosis la klappordon ; poste, kontentega, ŝi ekridis per muta rido, kaj kun freneza deziro danci sur la kapo de siaj kaptitoj. *(daŭrigota)*

Elfrancigis

Noĉjo Lagrafo (Francujo)

_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_

Eldonas Redakcio de ***Penseo***
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)
Retadreso: vejdo@163.com
Por legi pasintajn numerojn de Penseo, vin turnu al www.elerno.cn/penlisto.htm aŭ http://gazetejo.org/eo/penseo

◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_